

PENSEO

N-ro 397

Nov. / 2024

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 35-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Ĉielo stelplena

En ĉiel' stelplena, lumo fluas,
dum kontemplas ni kun menso ĉasta.
Stela lum' mistera nin influas,
kaj inspiras nin pri l' kosm' glorvasta.

Pensas ni pri l' senco de la vivo,
ĉio difinitas karmfatale.
En la kosmo flirtas sprit' laŭ drivo,
voj' al sav' sin sternas ideale.

El stelaro trovas ni trankvilon,
lum' la sankta flagras en la koro.
Fine vidas ni l' verecan brilon,
kaj klopodu kun la gracfavoro.

Ĉiel' as la spegulo de l' anim',
kaj tie trovas sin homviva rim'.

Sunsubira ruĝo

La suno nun descendas en hel-ruĝ',
kompateme kun lastlumo brila.
La tago dume svenas tuj en fuĝ',
kaj krepusko svarmas jen trankvila.

Temp' dumviva flosas tro rapide,
jam vesperas antaŭ nokta revo.
Pensas mi pri tarda am' medite,
kaj ankoraŭ nefarita devo.

Mi baniĝas en la roza brilo,
kun la koro ŝajne d' ard' juneca.
Releviĝas jam nun l' or-profilo,

kaj inspiras nin pri fato deca.

Baldaŭ flagros jen maten-aŭroro,
novkomenco glatos en favoro.

Serenado

Lirlas mia kant' leĝere
tra l' nokto al vi.
En kvietan boskon jen ekstere,
kara, venu al mi!

Flustrante susuras arbpintoj
en lunlum' favora.
Subaŭskulton de fi-perfidintoj,
ne timu, mia dolĉ-trezora!

Ĉu vi aŭdas najtingalojn kante?
ho, ili vin petegas.
Kun dolĉaj ĝemoj jen pepante,
ili por mi preĝas.

Ili kor-sopiron ja komprenas,
kaj konas l' am-doloron.
L' arĝent-tonoj jam tuŝtenas
ĉiun mild-teneran koron.

Kor-tajdo via nun torentu,
kara, do aŭskultu min!
Mi streĉate vin atendu,
venu, feliĉigu min!

*tradukita el Ludwig Rellstab (1799-1860); Muziko:
Franz Schubert (1797-1828); Soprano: Nana
Mouskouri*

Mia koro batos plue

Ĉiun nokton en la sonĝoj
mi vin vidas kaj vin sentas,

tiel scias mi, ke vi ĉeestas.

Transpasinte la distancon
kaj vast-spacojn inter ni jam,
vi venintas montri, ke vi ja alestas.

Diste aŭ proksime, kie ajn vi estas,
kredas mi, ke l' koro batas ja plu.
Vi denove jen malfermas pardonon,
kaj en mia koro vi ĉi tie estas,
kaj la koro mia batos plu kaj plu.

Amo povas tuŝi nin jam unufoje
kaj dum tuta vivo plue restas,
kaj neniam velkas nur ĝis ni foriros.

Amo estis kiam mi vin amis
ĉe la ĝusta tempo, kiun mi kaptintis,
mia-vive ĉiam ni antaŭen iros.

Timas mi nenion, dum vi apudestas,
scias mi, ke l' koro mia batos plu.
Ni por ĉiam kune restos tiel,
en la koro mia vi sekura estas,
dume mia koro batos plu kaj plu.

*tradukita el „My heart will go on“ de Will Jennings,
melodio de James Horner, prezentado de Celine Dion*

Mao Zifu (Ĉinio)



Mi fariĝos li
eble post unu semajno
sed sen ŝi.
Ĝin mi aĉetis sed ne ŝin.
Kiu volus esti ŝi ĉe mi?
Fantazi!!



de somero al vintro,
ekspire pasas unu nokto.
klimatizilo koleras:
kie estas printempo kaj aŭtuno?
mi bezonas ripozon!

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



La insul' de mia revo

La insul' de mia revo,
Sur la ondoj— blankaj mevoj,
Maro kantas kanton belan,
Sun' ridetas en ĉielo.

La insul' de mia revo...

En insul' neni' ektimas,
La ĉagren', sopir' forestas,
Ĝoje homoj, bestoj vivas,
Ĉiun novan tagon festas.

La insul' de mia revo...

En naturo – harmonio,
Kaj en la animoj ĉiuj,
Kunkantadas la birdaro
Se eksonas la gitaro.

La insul' de mia revo...

Regas en insulo Amo,
Varm' de sun', de koroj varmo,
La brakumoj kaj ridetoj,
Vivo paca kaj kvieta.

La insul' de mia revo...

Ĉiu homo en insulo,
Feliĉulo, feliĉulo!
La suferoj kaj doloro
Restis ie, ie fore.

La insul' de mia revo...

Granda blua mar' de vivo,
En boato – la junulo,
Li atingos eble iam
La insulon, la insulon.

Tie restis karaj sonĝoj,
Puraj kiel blankaj mevoj,
Kiel nokte la lumturo
La insul' de nia revo!

Al Meri Tiratsuyan

Ni ne hontu de vortoj sinceraj,
De amvortoj ne hontu en viv',
Mi deziras al Vi stelan mondon
Sonu kara por Vi melodi'!

Pretas verki plej belajn poemojn,
Estas Vi filinet' de aŭtun',
Vere ĉarma, aspekte kaj kore
“Brilas” en famili' kiel sun'.

Mi deziras al Vi verdan vojon,
Vi similas al flor' en ĝarden',
Ĉiutage ekaŭdu la vortojn
Pri bonfarto, feliĉo kaj ben'.

Mi ne hontas al ĉiuj rakonti,
Ke dankema al Di' estas mi,
Pro plej kara, plej bona infano,
Pro bonkora kaj bela filin'!


Amas Vin ĉiuj, homoj kaj bestoj
Pro la varmo de kor' kaj honesto,
Pro justeco, anim' via riĉa
Estu same belega, feliĉa!

Komprenas ĉiam Vi la vorton de la koro,
Kiel savanta stel', Vi brilas en la nokt',
Fortigas nin dum plag', en malfacila horo,
Pli bela iĝas viv', eĉ malaperas mort'.

Vi estas blanka vel' en maro senespera,

Kaj reviviĝas homo ofte dank' al Vi,
Ne ĉiam indas ni al Vi, la POEZIO
Vi estas nia rid', la ploro, flustro, kri'!

Ángel Arquillos (Hispanio)



Miaj grandaj projektoj

Mi havis grandajn projektojn
kaj nun mi tute solas,
... sen esperoj
vagante tra la mondo
laŭ la limo de l' ĉielo,
trovante nur fiaskojn
kaj gustumante venenon
kun falsaj geamikoj,
kaj ĉiam sen ĝusta celo,
foje kun tre granda timo,
foje kun rezoluteco,
sed kun duboj
pri miaj grandaj projektoj.

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Al la nepino

En mia nuna morna kaj malhela
sentaga nokto
ĉeestas unu radieto stela,
sed ŝia voko,
aŭ mokrideto, ofendiĝ' infana,
brakumo dolĉa
la mondon faras brila, diafana,
la viv-pendol' - ĉu
pro l'ekscitiĝo aŭ pro la ekĝojo
ĝis kora tremo –
balance iras laŭ feliĉa vojo,
kaj mia memo
konjektas lumon de la am' sincera,
kiun scipovas
infana kor', de ajna pek' libera.
Do mi retrovas
en mia nuna morna kaj malhela,

noktaĉo mava,
ke l' radieto estas plej fidela
apogo sava.

Senkompataj raketoj
flugas en fum-nebulo.
Mi malamas la bildon,
maltrankvilas mi pri vi,
kiuj kuras en kelojn,
kiuj serĉas la ŝildon
kun petego-postulo:
- Ne malhelpu nin vivi!

Jes, prezentas suferon
la vivig' de l' dezerto?
Por beligi la teron
endas ŝvite aktivi.
La popol' laborema
nun aklamas kun certo,
kun aspiro al paco:
- Ne malhelpu nin vivi!

Emas uloj sen honto
homamasojn direkti
al kruelo milita,
sangavide lascivi.
Ĉu ne povus la mondo
sin fidi protekti
kontraŭ tiuj per krio:
- Ne malhelpu nin vivi!

Ŝatus ĉiuj popoloj
en la pac' kaj konsento
al disfloro de l' Tero
kunlabore ekdrivi...
La kvar vortojn plorĝemajn
monden portas la vento:
- Ne malhelpu nin vivi!
- NE MALHELPU NIN VIVI!

Vastiĝas la nokt' sen kompto
en la mezoktobra etero.
Aŭtuno. Pli feblas korbato
kaj ŝultroj kliniĝas al tero.

Aŭtuno. Gutetoj – la lensoj
sur oro folia trembrilas,
ekglimas en kape mil pensoj,
la mens' kaj anim' maltrankvilas.

Aŭtuno. Ventego ekbleka
protekton ombrelan detruas,
kaj ĉio humida, malseka
aŭguras, ke, ŝajne, malfruas

akceloj, aspiroj, elanoj,
eĉ revoj pri onta bonŝanco,
ke ne realiĝos la planoj...
Sed kreskas en kor' disonanco

de l' vent' kaj de l' floroj humilaj,
do jam malpli gravas pensem' ol
senkulpa flavet' kamomila,
kaj bluo de lastaj pensoj.

Finna aŭtuno

Ŝtonoj kadukas en tempofluo,
regas trankvil' inter bluo kaj bluo.
Kredas apenaŭ varmo granita
famon pri la somero finita.

Ruĝo, skarlato, punco, purpuro
pompe plektiĝis en verda veluro.
Kupro kaj oro, bronzo, latuno -
jen la vesto de finna aŭtuno.

Lago lascivas ekster labor', do,
brunajn boatojn brakumas ĉe bordo,
kaj el la fundo, el akvosino
supren iras la sun'-karmezino.

Kaj la perukon el okro kun rusto
prove surmetis ĉiu arbusto.
Zorgas trankvile morti en festo
de l' naturo kvieta majesto.

Nur disonance en movimento
sonas sopira kordo de l' vento,

svinge spiretas lace petola...
Ĉu ne tro da kviet' por mi sola?

Feri Floro (Hungario)



Ni estas fablo

Ni estas fablo kun moral'
ni estas teksto en ĥoral',
ni estas bela histori',
korpoj kune en harmoni'.

Ni estas du geanimuloj,
unu voĉo el du buŝoj,
unueco el du korpoj,
dolĉaj, silentaj versoj.

Ni nian soifon aman kvietigas,
nian amon elkore ni nutras,
ni estas proz' sen rimo,
unu poem', dolĉa vino.

Ni estas tero kaj ĉielo
de l' ŝtormo ĝia forto.
Ni kune estas jen la pasi',
kiu zorgojn povas solvi.

Sen vi

Mi amas vin en mallumo,
kie la ombroj obstinas,
kie leviĝas la luno,
la frenezo komenciĝas.

La fulmo ronda vi estas
kiu min ĉinokte lumigas,
sen vi la vivo finiĝas,
sen vi en mallum' mi vivas.

Vi estas vere mia spiro,
aero mia de la vivo,
sen vi ne gravas la mondo,
sen vi ne estas nuntempo.

Lumradio en mia vivo
de superfluanta ĝojo,
sen vi la vivo malvarmas,
mia amo nur en vi fidas.

La spuroj de la firmamento,
plenigas nin per la kareso,
sen vi mi la vivon ne volas,
sen vi la vivo mallumas!

Mi estas mia luno

Vi estas mia luno kaj suno,
mi, la amo kaj vi la plezuro
favoras nin jen la fortune,
ni kune vivas en granda ĝojo.

Mi estas maro vi estas ondo,
mi estas nokto, vi, mia sonĝo.
Mi estas la maro, vi estas ondo,
mi estas la nokto, vi, mia sonĝo.

Vi estas fajro, vi estas vento,
kies fort' ekflamigas mian rideton
vi, mia muzo kaj mi la kanto
ni uzu kune tiun eblecon.

Mi estas korbato, vi, la pasio,
ĝi plenigas min per emocio.
Kune ni estas la universo,
sincera amo, sen reverso.

Viaj okuloj, steloj kiuj gvidas,
via voĉo min trankviligas,
ĝi kvietigas miajn marojn
helpas forgesi la ĉagrenojn.

Venu, dancu kun mi la vivon

Ni estas kune ĉar mi scias mi povas fidi vin.
Ni estas kune ĉar mi ŝatas aŭskulti nin.
Mi ŝatas, ke vi sendogme, sekvas vian vojon.
Mi ŝatas, ke vi agadante uzas vian koron.

Ni pasigas tempon kune, kviete senprobleme,
sur la ĝardenbenk' intime, en feliĉ', en
harmonij, kune.

Donu al mi vian manon, aŭskultu mian kanton,
ni realiĝos la imagon, venu, dancu kun mi la
vivon.

Ni restas kune ankaŭ se vi ekscitiĝas,
ni restas kune kaj la zorgojn mi bonvole
solvas.

Mi ŝatas, ke vi trankviligas mian koleran
kapon,
mi ŝatas, ke vi estas preta kunvivi ĉiun
ŝtormon.

Wélington Rocha (Brazilo)



Ambalado

Am'— stranga rad (iko)
rave nin trenanta sento,
sub kies efiko
mirindas ĉiu momento !

Am'—spite al haltoj
sugeste de kio ajn,
sekvas, se 'stas saltoj
ankaŭ tio estos fajn'.

Am'— tia ond' atlantika ,
ero de animo dolĉa,
min igas, ul' agnostika,
seneskape dien sorĉa.

Am' — dezirindegas ardo,
garanti' de viv' enorda ,
brakum' sen straba rigardo,
vivolir' laŭdece korda . . .

Odo al Vivien

Mirtela
Lumflua
Ĉiela
Freŝblua

Sur tero
Radia
Belero
Eldia

Jam por ni
Vi iam
Nun kun vi
Di' ĉiam



*Rim. La versaĵon inspiris la aldonita foto (trovita en
la reto) pri brita aktorino Vivien Leigh (nov 5an
1913 -- jul 8an 1967)*

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Muzikkaruselo

Turniĝas karuselo
en nia hejm' por ni.
Ne grandas, sed tre belas:
foirplac-fantazi'.

La lum' interne brilas
per eta bateri'.
Stelar' trembrile lumas;
tre bela iluzi'.

Muzik' ĝin akompanas;
jen kant' el Hispani'.
La sonoriloj tintas
en granda harmoni'.

Ĉevalo preterflugas,
kaj cigno kaj kamel',
ĝiraf' kaj elefanto
sub bluo de ĉiel'.

Jen sledo kaj kaleŝo,
kaj ŝip' kaj zepelin'.

plu fajrbrigada aŭto,
lokomotiv' ĉe l' fin'.

Turniĝas karuselo
en nia hejm' por ni.
Ne grandas, sed tre belas:
foirplac-fantazi'.

Eugene Khvalkov (Rusio)



Aŭtuno venas

aŭtuno venas,
folioj dancas en la vento
kiel oraj songoj flosas.

sur la vojo
siblas la aŭtuna vento
melankolie.

en aŭtuna lumo
sunaj koloroj tremas,
tempo silente fluas.

en aŭtuna vento
korvoj gakas triste,
rondflugante en aero.

aŭtuna pejzaĝo
alportas rememorojn
pri pasinteco.

en aŭtuna tago
nebulos pendas,
super arboj kun maturiĝintaj fruktoj.

aŭtuna suno
ĵetas varmajn radiojn
al la ĝardeno.

en oranĝa koloro
arbustoj sin vestas nun
skuante en aŭtuna vento.

falintaj folioj
kovras la teron
per flava mantelo...

trankvila naturo
kvietas ĉiam
en duondormo.

vento susuras
kiel lulkanto
inter arboj en diversaj koloroj.

aŭtuna pluvo
ekfalas malrapide,
kvazaŭ malĝoje plorus.

aŭtuna etoso,
friska kaj malvarmeta,
volvas la mondon.

Jadranka Miric (Serbio)



Dankokiso

Vi, filo mia,
kiel anĝelo-gardanto
jam dekoj da jaroj
estas mia animsavanto.
Viaj okuloj ne ĉiam brilaj
parolas multe ol vi kapablas,
tenas min ke mi ĉiam fortas
kvankam en mi pluvos.
Kiel proksimiĝas mia maljunec'
kaj senzorgaj tagoj pasis,
pli ofte mi pensas pri vi,
pri via necerta estontec'.
Tiaj pensoj timigas min.
La infano en vi
kaŝigas timon. Kune ridetas ni.
Brakumante mi kisas vin.

Aŭtuna preĝo

Ĉielo kun nuboj griza
similas al aranea reto.

Surtere okulfrapas piza
koloro de la lasta herbejeto.

Tra ŝanĝo de farboj
de jam falinta foliar'
ekas novaj sezono-aventuroj.
Sama al bestar' kaj malsama la homar'.

Milda venta tuŝo
sankta vorto sur buŝo
ofte benita preĝo
al Dio, nia reĝo:
"Faru ke homo al homo ne estu lupo!"

La unua renkontiĝo

En la ĉefa strato
ekvidis mi vin, ho, amato!
En homamaso mi perdita
kvazaŭ mi estus de homoj izolita.

Animo flamiĝanta,
kaj genutremas,
kaj okuloparo
fajrere brilanta.

La subiranta suno ruĝiĝas
kiel vangoj miaj.
La korflameco malpermesis al mi
ekparoli. Tiam alproksimiĝis vi.

La manoj viaj plektiĝis
honte sed forte kun la miaj.
La korbatoj forte aŭdiĝis,
kaj niaj lipoj ekridiĝis.

Vi foriris al kino,
via amiko insistis.
Al mi plaĉis via inklino.
Morgaŭ niaj vojoj reinterkruciĝis.

Malfrua aŭtuno

Sur blua vasta ĉielo
La blanka aviadilospuro kvazaŭ en hasta
elpelo..

Li sur motociklo kun brunulino
dolĉa kiel bombono aŭ sorĉistino.

Suno ankoraŭ oriĝas.
Tamen la ĉiela koloro ŝanĝiĝas
dum lasta sunradio
droniĝas en malhelo, laŭ volo de Dio.

Eĉ freneza norda ventaĉo kvietiĝis.
Sufiĉe ĝi kaŝe gvatis sub inaj jupoj kaj laciĝis.
Tamen ĝi sukcesis ridojn ellogi
de inoj estinte tia forta kaj fivalora.

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Ĉiutage amo salutas

Ne ekzistas poemo jam perfekta
por priskribi la majeston de amo.
Kaj amo ne estas vorto, kiu
elvaporiĝas el l' buŝo
de forgesemulo.

Amo ĉeestas en ĉiu lingvo.
Kvankam ulo regas mil dialektojn,
neniu garantio, ke li estas vera amanto.
Am-lingvaĵo ankoraŭ ne estas ago!
Mi ne intencas argumenti pri amo
ĉar amo ne estas argumentoj.
Kaj kvankam nun mi konversas,
ni diru, ke mi provas kompreni.

La universo estis kreita kun amo;
homoj ĉeestas kiel fruktoj de amo.
Ĉiu nova tago alvenas pro amo;
kaj por ĉiu kreitaĵo, estas amo.

Erika Godó (Hungario)



Oktobero

Oktobero venas, vento malvarma blovas,

sur branĉoj de arboj flavaj folioj dancas.
 Kavalkado de koloroj, naturo lumas,
 la magio de aŭtuno ĉion malbonan forpelas.
 Matena roso kiel perloj sur la herbo,
 malgrandaj sekretoj kaŝitaj inter branĉoj.
 La tero sopirigas iom ripozon post somero,
 ĉiu folio flustras adiaŭon pri la bona vetero.

Vestita en belaj koloroj, naturo floras,
 dum sunradioj tra nuboj milde brilas.
 La kampoj silentas, rikolto finiĝas,
 sub la ĉielo griza, la mondo trankviliĝas.
 Vesperoj longiĝas, tagoj iom mallumiĝas,
 kaj ĉe la fajro, nia animo pli varme sentiĝas.
 Oktobro alportas al ni la pacon en nia koro,
 la naturo jam prepariĝas por sia vintra dormo.

Kiu estas mi?

Mi estas nur vaganto en la mondo,
 mi flugas sur la flugiloj de miaj revoj.
 Mi serĉas mian vojon, malkovras la lumon,
 ĉiu paŝo estas nova, ekscita malkovro.
 Sekretoj, deziroj kaj esperoj profunde en mia
 koro,
 memoroj brilantaj en la spegulo de mia
 pasinteco.

Mi estas kuraĝa, sed foje mi estas nesekura,
 mi marŝas la vojon de la vivo, foje mi
 blokiĝas.
 Mi batalas jintraŭ la venton kaj la tajdo,
 estas miraklo kaj ebleco en ĉiu mia defio.
 Kiu estas mi? Mi estas rakonto, songo,
 mistero,
 mi estas homo, kun sekretoj de la estonteco.

La flamo de la forno

La flamoj de forno dancas, hele,
 la koro malsatas pro ĝia varmo.
 Flamo brilas flave, oranĝe, ruĝe,
 rakontas pri sekretoj de fajro.
 La ligno flustras, ardaĵoj kraketas,
 silento ĉirkaŭe, nur magio restas.
 La fajro varmigas mian animon,

en malvarma nokto mian rifuĝejon.
 La flamo de la forno, mia fidela amiko,
 en ĝia lumo, mi trovas ĉiam pacon.

Mia patrujo

En la brakumo de verdaj montetoj,
 kaŝitas malnovaj malgojaj rememoroj.
 En la malvarmeta akvo de riveroj,
 speguliĝas bildo de mia infaneco.
 Neĝkovritaj montpintoj estas senfinaj,
 kiuj konservas miajn sekretojn.
 En ĉiu freŝa vento, en ĉiu silento,
 mi aŭdas la vokon de mia patrujo.

Memoro de flaviĝantaj tritikaj kampoj,
 ŝvebasodoro de floroj, oraj dolĉaj revoj.
 En la malvarmeta ombro de verdaj arboj,
 la vento flustras rakontojn malnovajn.
 Vi estas valora trezoro por mi,
 mia animo kaj koro vivas ĉiam en vi.
 En mia tuta doloro kaj ĝojo en vivo,
 vi estas mia hejmo, mia eterna koro.

La maljuna vagabondo

La tagiĝo kreviĝas, nova tago komenciĝas,
 la sunradioj tra la malhelaj nuboj brilas.
 La celo de la vagabondo estas nekonata,
 lia vaganta koro estas kiel libera birdo.
 Ekblovo de vento karesas lian vizaĝon,
 lia sako estas plena de timaj gardataj
 sekretoj.
 Malantaŭ lia pasinteco, nur rememoroj
 ekbrilas,
 kun lacaj kruroj sed feliĉa animo li migras.

Ĉiu paŝo nova estas aventuro sur lia vojo,
 li migras sur la bordoj de riveroj, sur valoj
 de montoj.
 Li serĉas sian propran vojon dum sia tuta
 vivo,
 sub fajra suno, inter la steloj en la mallumo.
 Li trovas novajn amikojn, foje li adiaŭas,
 sed li ĉiam trovas hejmon, kien ajn li iras.

Vaganto, kiu elektas la vojon de scio de la mondo,
kaj la vento de libereco blovas sian kanton.

Kanto pri Esperantujo

Ekzistas lando, kaŝita en la koro.
Tamen vi ne trovos ĝin sur la mapo.
Esperantujo, la mondo de la revoj
Kun verda espero, plena de amikaj vojoj.

Esperantujo, nia hejmo sen limo.
Lando de amo, ligas nin kun amikeco.
Sub la suno brila, vortoj flugas libere.
Ĉi tie niaj verdaj koroj restas kune.

Buntas vilaĝoj, montetoj en la vento.
Bluaj riveroj kantas kun la sento.
Homoj promenas, ridetoj ĉie brilas.
Nia celo estas paco en la mondo.

Esperantujo, nia hejmo sen limo.
Lando de amo, ligas nin per amikeco.
Sub la suno brila, vortoj flugas libere.
Ĉi tie niaj verdaj koroj restas kune.

Ne nur lando, sed sento en la koro.
Esperanto gvidas nin al la feliĉa estonto.
Kie ajn ni iras, ni trovas la vojon,
Esperantujo, vi estas nia lando.

Esperantujo, nia hejmo sen limo.
Lando de amo, ligas nin per amikeco.
Sub la suno brila, vortoj flugas libere.
Ĉi tie niaj verdaj koroj restas kune.



En la retejo Facebook okazis poemfara stafetado kun la temo "pluvo", jen kelkaj samideanoj partoprenis en la stafeto"

Erika Godó:

La danco de la pluvo
(kantteksto)

Nuboj kolektiĝas sur la ĉielo en silento,
la pluvgutoj komencas fali malrapide.
La tero soife trinkas la pluvon,
ĉiu guto alportas novan esperon.

La vento flustras tra la arboj,
la pluvo ritme batas mian koron.
Estas kanto en ĉiu guto,
kiu rakontas pri sekretoj de vivo.

La pluvo dancas, la lumo dancas,
la sunobriilo iom ripozas.
Ĉiu guto alportas novan vivon,
la mondo ĉiam dancas kun la pluvo.

La vento flustras tra la arboj,
la pluvo ritme batas mian koron.
Estas kanto en ĉiu guto,
kiu rakontas pri sekretoj de vivo.

Pluvgutoj brilas sur la stratoj de la urbo,
miaj revoj kaj deziroj speguliĝas en ili.
La kanto de la pluvo akompanas miajn paŝojn,
la pluvo lavas ĉion pura en mia animo.

La vento flustras tra la arboj,
la pluvo ritme batas mian koron.
Estas kanto en ĉiu guto,
kiu rakontas pri sekretoj de vivo.

La pluvo dancas, la lumo dancas,
la sunobriilo iom ripozas.
Ĉiu guto alportas novan vivon,
la mondo ĉiam dancas kun la pluvo

Rita Mkrťjan:

La pluv', silento kaj sopiro
Senmovaj arboj ekmeditas,
Pri kio pensas la folioj
La spuroj oraj antaŭ foriro?

Kaj iu fotas sub la pluvo
Belecon de natur' magia,
Ĉu aŭtun' trapasas, aŭ vivo?

Esperoj, revoj, atendado nia.

En regno vintra— montojn neĝajn
Nebulo kovris, sed ĉi-tie
La adiaŭ' de aŭtuno
Sur mano kuŝas la folio.

Pasanto daŭrigas foti
Pro pluvo frostas, pro malvarmo,
Neni' komprenas, kion fotas
Ĉu aŭtunajn aŭ siajn larmojn...

Yi Qiao:

Mi promenas en pluvet' frekvente,
serĉe ion en pluvet' prudente.
Flosa poemeto ĝi kvazaŭas,
obsedante en la kor' ĉirkaŭas.
. . .
En pluveto estas mi soleca,
sed sen spuro sur vizaĝo deca.
Kiam ŝvebas la pluvet' apude,
jen vekigās la rememor' netrude.

Carlos Oliveira:

La signoj de pluvo

La formikoj moviĝas,
Blatoj flugas en malordo,
Ĉi tiuj estas la signoj, ke la pluvo venos.

La nuboj aperas,
La birdoj ĉesas kanti,
Ĉi tiuj estas la signoj, ke la pluvo venos.

Laodoro de malseka tero,
La ĉielo ŝanĝas koloron,
Ĉi tiuj estas la signoj, ke la pluvo venos.

Ranoj kvakas pli intense,
Katoj kaŝiĝas,
Ĉi tiuj estas la signoj, ke la pluvo venos.

Kiam ŝi alvenas, ŝi donas vivon
Ĝi foje inundas kaj kaŭzas morton,
Sed la signoj estas tie ekstere.

&&&&&

Åke Näsholm (Svedio)



Kvankam marŝas ni soldate,
kore revas ni pri pac'.
Por informi ĝis konate
kontinuas ni sen lac'.
Konatigi nian lingvon
estas por ni grava cel',
ĉar laboras por la paco
multaj jam sub verda stel'.

Ni, la pacaj batalantoj
vokas al la homfratar',
sonu amoplenaj kantoj
laŭte super ter' kaj mar'.
Ĉie en la mondo regu
ĝusta kaj detala pac',
malarmado etendiĝu
el profundo kaj tra spac'.

Saulo Salgado Wanderley (Brazilo)



Nature

Nature ni vivas pensantaj pri Paco
kiel lumo necesa sur niaj vojoj;
senpaca vivo estas terura minaco
kontraŭ la enaj sonĝoj de niaj koroj...

Nature ni volas Feliĉon por fakto
kiu eliminus ja nian malĝojon;
malfeliĉa vivo estas terura stato
kiu vere malfortigas nian volon...

Tiamaniere pri bono pensantaj
ĉiuj devas resti survoje marŝantaj,
ĉar Paco ne estas medalo al nenio!

Se pri la Feliĉo envive sonĝantaj
ĉiuj devas resti survoje amantaj,
ĉar Feliĉo ne restas ĉe ni sen tio!

Kresku Esperanto!


Ĝi progresas el La Lumo al La Lumo
flame varmante la amemajn korojn
kiel konvenas al la vivo-dumo
pli riĉigante de la vivo horojn;

konsekvence pro la amagaj sumo
kiu nin oferas belegajn florojn
al ni sendataj de La Dia Plumo
altigos nin al belajn honorojn;

akcelu, do, amon, kiel vi povas
ĉar vi certe, multege, amipovas
kaj vi ĝin vidos ĝuste je via flanko;

akcelu, do, vian korkariton
tiel al ne- kiel al la bonamato
kaj tiel kreskos nia Esperanto!

Elena Popova (Bulgario)



Ĉe Sunsubiro

Vojo serpentumas tra la verdaj herbejoj ĝis
rondetaj montetoj. Li ŝajnas malĝoja, soleca.

La ĉielo estas ekscitita, nigraj nuboj tranĉas
la bluan, verŝajne pluvos ie. Ne estas homoj,
bestoj nek eĉ birdoj, kaj ili kaŝiĝis en atendado.
La suno ankoraŭ brilas, sed baldaŭ ĝi kaŝos
sin malantaŭ la monteto por alporti lumon
aliloken.

Ankoraŭ unu tago forlasas la kalendaron,
kion ĝi alportis al la homoj, kion alportos
morgaŭ? Paco estu!

Shi Yu



Eterneco en Momento

ho vi! ne sunumu vian ombron en vundon
kiu estas okulpikanta, kaj la tempo estas
afliktita

ho vi! kiam sendormema najtingalo kantas
sub la steloj,
ne lasu la sopiron malvarmumiĝi
somere, cikadoj kantas foje kaj refoje,
mankas al malnova gitaro en la angulo via
tenereco
aŭtune, la vento blovas foje kaj refoje,
mankas al lignaj ventosonoriloj apud la
fenestro via konsolo
ho, mi rigardas al la lunarko, kiu rondiras
senhalte
la grizaj domoj starantaj kontraŭe ekhavas
sulkojn
ho, mi rigardas al la suno, kiu leviĝas kaj
subiras
jen fenestropordoj, kiuj enŝlosis mian
koron
ne lasu la pluvon malsekigi ĝin
ho vi! ho vi!
aŭskultu ree, aŭskultu ree
ĉu la vento ankoraŭ blovus
tiel milde, tiel milde
ho mi! ho mi!
ankoraŭ plu, ankoraŭ plu
aŭskultu la sonon de pluvo
kiu alportus malsekiĝon



Forigita de la vento kaj pluvo

oktobro ĉirkaŭas ies urbon
murpinta aŭroro alportis pasintaĵojn foren
malfrue reveninta hirundo ne volas
preterpasi la tenerecon de aŭtuna suno
nokto, palpebrumas iom
lunarko pigras, kaj pigras

sopiroj elverŝas
 la vento disiĝas silente unu post la alia
 pluvero ne estas tenata en la sino
 oni aŭdis, ke ĉiuj larmoj fluas en la nordo
 riveroj kaj valoj tre okupiĝas
 la vento konsterniĝas
 nokto retrorigardis ĝin malestime
 oktobro ne ĝojegas
 al kiu iu apartenas ,kaj ŝtopiĝis en soleco
 amo estis forigita de la pluvo kaj vento
 tiu stellumo
 malvarmigas nokton
 Jen la originalo en la ĉina:

Foje

kiam vento forbalais flavon
 aŭtuno estis jam matura
 vento kaj pluvo frue velkigis branĉojn
 trafiksignaloj funkcias regule
 nur aŭtoj pasis rapide, restas vaka strato
 signaloj ŝaltas aŭ malŝaltas lumojn
 kvazaŭ kiuj venigis venton kaj pluvon
 ekster la fenestro, ĉio estas tre kaosa
 vi kurbiĝas kiel kato
 kuŝante antaŭ la fenestro
 kviete aŭskultas venton kaj rigardas
 pluvon
 ĉio estu eble sekura

Ma Wei



Funebron al aŭtuno

Kiam ĉiuj lampoj estas lumigitaj,
 mi surbordiĝis kaj finis mian vagadon,
 ĉio estas tre trankvila kaj stabila.
 Mi antaŭsciiĝis pri ĉio de venonta vivo:
 mi povos pleniĝi fendojn en iu jaro,
 mi povos konstrui kastelon en iu loko,
 aŭ mi renkontus iun, kiun mi ne indus renkonti
 en nekonvenaj tempo kaj loko.
 Kiam iu gajnas ion, tiam tiu eĉ perfidus tion,

sed la serĉadon mi rezignus, mi ne perfidos
 ion,
 Plej malbone mi sinmortigus per tranĉilo,
 dediĉu la mortintan kadavron al realo,
 Plej malbone mi plukus florojn per mil
 fingroj,
 dediĉu la falintan solecon al idealo.
 Plej malbone mi estus gasto en gastejo,
 dediĉu la silentan kaj eternan naskiĝlokon al
 memoro.



Nokto sen stratlampoj

oni eĉ ne povas vidi ombron sur nokta vojo
 nur mi, akompananto de arboj
 la frida vento blovas en aŭtuna nokto
 mi sentas la solecon jam ĝisostan
 preterpasante soforon, sekve poplon
 kaj laŭro preparas dissendi sian aromon
 nun mi eĉ ne povas vidi miajn fingrojn
 sed mi povas klare distingi ilin
 kaj pensu, ke ĉiu arbo, kiu sola gardas la
 nokton, estas ja bonega
 ĉu ĝi floras aŭ ne, ĉu ĝi fruktas aŭ ne
 ili ĉiuj amas la mondon silente, senhezite
 kaj ĝuas absolutan lumon
 kaj akceptas absolutan mallumon
*Ma Wei estas juna ĉina poetino, ŝi laboras en
 urbo Xi'an, antaŭ ne longe ŝi eklernas
 Esperanton, nun estas membro de Xi'ana
 Esperanto-Asocio, ŝiaj poemoj aperis en
 diversaj ret-gazetoj de Ĉinio.
 Esperantigis*



Ardo (Ĉinio)

Mark Simoni

Peza estas la kaftano de la Libero

Dum ĉi tiuj 51 vivjaroj
 mi ankoraŭ ne scipovis
 ĉu pli bone estas paroli aŭ silenti,
 ĉu pli bone estas supreniri lekante
 aŭ resti kun rekta korpo
 viŝante la ŝviton subokule,
 ĉu pli bone estas levi la kapon pro la
 maljusteco
 aŭ akcepti tion mallevkape,
 nur por pluhavi varman porcion da aveno,
 ĉu pli bone estas rigardi okulfrape
 la homojn dum ili suferas pro la malsato
 kaj pro lumomanko dum vin blindigas la
 lumo.
 ĉu pli bone estas rezonadi memstare
 aŭ esti karnopeco kun du okuloj,
 ĉu pli bone estas posedi bonkorecon kaj
 bonanimon
 aŭ esti unuĉela amebo enspiranta.
 En ĉi tiu 51-a datreveno
 ankoraŭ mi ne scipovas kio estas pli bona en
 la vivo,
 tamen mi mem forte konvinkiĝis
 ke la plej grava afero
 por ke sentiĝu homo
 estas la batalo por resti libera.
 La vivo instruis min ke la Libero estas
 multekosta,
 sed verŝajne mi jam decidis ekde la infanaĝo,
 ke ĉiun prezon mi pagos nurnure
 ke la kaftano de la Libero bone konvenu al mi.

Anton Pappleka



Sonĝo

Mi vidis min kurante
 kun mia hakita kapo subaksele
 tra la sanguma ebenaĵo

Postsekvis min grupo de ĉevalrajdistoj

kun rustiĝintaj kaskoj

Ili volis ja forkapti
 mian hakitan kapon

por alkroĉi ĝin sur la palison
 kaj por rondodanci ĉirkaŭ ĝi tribajn dancojn
 akompanataj per la venka kriado kaj per
 ululado

Mi kuradis tra la sanguma ebenaĵo
 kun mia hakita kapo sub la akselo

La ĉevalrajdistoj volantaj forkapti
 mian hakitan kapon
 plenigis la subĉielon per la trotado
 kaj per hufumaj briletoj.

Ankoraŭ kiom da tempo mi starus surpiede?

Kiu ekfalus surteren la unua
 mi, alfliktiginta la ebenaĵon per trapelado
 mia
 aŭ la ĉevalrajdistoj kun siaj vagadaj ĉevaloj
 elbuŝigintaj sanguman ŝaumon?

Tion ja ne sciis
 eĉ la senfina ebenaĵo kie mi kuradis
 kun mia hakita kapo sub la akselo

nek la suno nin rigardinta de supro
 kun sia kosma malkonsidero...

elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

El la ĉina antikva poezio

Nalan Xingde (1655-1685)

Transiro trans landlimo

—laŭ melodio *Papilio super floroj*

De antikvec' ĝis nun la regna limo
ne estas fikse certigita laŭ difino.
En sonoj de pentrita klariono
militĉevaloj iris kaj reiris por domino.
Al kiu, do, vi povas diri pri l' sovaĝejo
kun sun' kovrita de flavsabla la pavimo?
La vento okcidenta blove maljunigas
acerajn arbojn senkompate laŭ destino.

En pasintec' sennombras la suferoj.
Ĉevaloj feraj kaj armiloj de
metalo levis jen militojn re kaj re,
ĉe l' tomb' de Zhaojun, kiu per la viv-pere'
transiris limon por akiri interregnan pacon.
Iama ŝia sent' profundis, kiom tre
profunda de komenco ĝis la fino?
Ja kiel statas ŝia maŭzole'
sub pluv' senĉesa inter montoj
en lumo de l' subira sun'? Ho ve!

—laŭ melodio *Longa sopiro*

Trans montoj kaj riveroj
al la pasejo Shanghai ni jen militiras.
Ennokte l' lampoj lumas
jen en mil tendoj kun malhelo.

Ekflirtas neĝo kaj ekblovas vento.
Brueg' disrompas songon de sopiro
al hejmo for mil liojn kiu en trankvilo
nun dronas neĝenate de la veterplendo.

—laŭ melodio *Longa sopiro*

Falintaj folioj ja kiel
la song' en nebulo.
vespera la lumo de suno sinkanta
penetras en domon ĉe la okcidenta angulo.
en kiu aromas la fumo de mosk' en cirkulo.

Ĉagreno senlimas,
magriĝas mi en buduaro.
Do, kiu ja havas komprenon?
Mi, kiam libera, kun kora amaro,
instruas mi al la papago en jada kaĝeto
parkeri ja liaj versaĵojn pri amodeklaro.

elĉinigris



Vejdo (Ĉinio)

Meng Jiao (751-814)

Vespera Vido en Luoyang¹

sub la ponto Tianjin² ĵus frostiĝis la glacio.
sur la stratoj de Luoyang homoj ne troveblas.
pavilionoj vakas ĉe salikoj sen folio,
sub lunlumo la surmonta neĝo nur videblas.

Noto:

1. Luoyang (Lŭojango) situas sur la centra ebenaĵo de Ĉinio, ĝi estas unu el la luliloj de la ĉina civilizo, apartenanta al la 4 grandaj antikvaj urboj de Ĉinio.
2. Tianjin-ponto situas en la okcidento de Luoyang, sur la rivero Luo.

Elĉinigris



Ardo (Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Nokta ĉielo

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu**

I.

Lunlumo nokte brilas,
ĉiel' trankvilas.
Vervo flagras en la kor',
min inspiras kun la gracfavor'.

La kosmo pompas vasta,
kun volo ĉasta.
Ŝvebas jen sankt-sprit' laŭ driv',
dotante al ni l' sencon de l' viv'.

